

Nº 06
1969

G.L.GIMELLI

# ITALA fervojisto

Organo
Associazione
Italiana
Ferrovieri
Esperantisti





IFEA

# BONDEZIROJ

OKAZE DE LA VENONTAJ FESTOJ, LA ESTRARO DE ITALA FERVOJISTA ESPERANTO-ASOCIO "I.F.E.A." KAJ LA REDAKCIO DE "ITALA FERVOJISTO", VARME BONDEZIRAS FELIĈAN KRISTNASKON KAJ PROSPERAN NOVJARON AL ĈIUJ MEMBROJ KAJ SIMPATIANTOJ DE NIA ASOCIO, KORAJN BONDEZIROJN ANKAŬ AL ESTRARO DE LA INTERNACIA FERVOJISTA ESPERANTO-FEDERACIO "IFEF" KAJ AL LA TUTA ANARO KAJ LEGANTARO EN ĈIUJ LANDOJ. AL TIUJ ĈI BONDEZIROJ ALDONAS LA PROPRAJN LOKA KONGRESA KOMITATO "L.K.K." de la 22-a I.F.E.F.-KONGRESO EN RIMINI.

xxxxxxxxxxxxxxxxxx

## 22-a KONGRESO DE LA INTERNACIA FERVOJISTA-ESPERANTO-FEDERACIO "IFEF"

RIMINI (Italio) de sabato la 16-a ĝis vendredo la 22-a de majo 1970-a

Sub la aŭspicioj de F.I.S.A.I.C. kaj de DOPOLAVORO FERROVIARIO.

KONSTANTA ADRESO: 22-a IFEF-KONGRESO, Via Donato Creti, 61 = I-40128 BOLOGNA (Italio). Post la 1-a de majo 1970-a oni devas adresi ĉe DLF Viale Regina Margherita, 109 = I-47037 RIMINI (Italio).

POŜTKONTO: N-ro 8/24094 de IFEA, Via Donato Creti, 61 = I-40129 BOLOGNA.

BANKKONTO: C/C n-ro 02586 de DLF ĉe BANCA NAZIONALE DELLE COMUNICAZIONI, Via Rizzoli, 20 = I-40100 BOLOGNA (Italio).

KONGRESEJO: Teatro "NOVELLI" en Rimini.

INFORMA BULTENO

Kongresaj kotizoj: Kongresano: ĝis la 31-1-1970: Lit.4500,- post la 31-1-1970 ĝis la 30-4-1970: Lit.6000,-. Familiano-Pensiulo-Junulo ĝis 21-jaroj: pagas, respektive, la duonon.
Simbola aliĝo: (Simpatianto kiu ne vizitas la Kongreson) minimume Lit.1000,-. Tuj post la kongreso li ricevos la kongresajn dokumentojn. LA KONGRESKOTIZO NE ESTAS REPAGEBLA.

Loĝejoj: La hoteloj, tute apud la maro, estas de la sama kategorio: prezo por tranoktado kaj kompleta pensiono (sen trinkaĵo): Lit.2000,- po persono po tage. (Por la tuta semajno de la 16-a vespere ĝis la 22-a de majo vespere: Lit.12.000,- ĉio enkalkulite escepte la trinkaĵoj). Nur tranoktado: Lit.1000,- po persono kaj nokto enkluzive matenmanĝo. Ĉambroperado. Prezo po persono: Lit.200,-. La ĉambroperado estas deviga.

Manĝoj: Ĉiu manĝo (sen trinkaĵo): Lit.1000,-. La manĝoj okazos en la samaj hoteloj kie loĝos la kongresanoj.

Glumarkoj: L.K.K. pretigis kvinkolorajn glumarkojn kiuj simboligas la kongresurbon, Esperanton kaj fervojon, pere de skizita velo sur maro kaj fluganta rado sur verda kvinpinta stelo. La prezo estas, po folio de 4 ekzempleroj: 50 italaj liroj plus sendkosto.

Aliĝiloj: L.K.K jam pretigis la ALIĜILOJN kaj sendis ĉe ĉiu landa reprezentanto kaj interesulo, kvanton da ili. Bonvolu mendi ĝin tuj.

Ekskursoj: Duontaga ekskurso al SAN MARINO (km.24 de Rimini). San Marino estas la plej malgranda kaj antikva sendependa Respubliko en la mondo. De Rimini oni atingas ĝin en malmultaj minutoj per moderna aŭtostrato. Tie oni povas aĉeti belajn tipajn ceramikaĵojn, ne multekostajn, la bonegan ŝaŭman vinon "Moscato" kaj poŝtmarkojn. Antaŭvidita lundon la 18-an de majo posttagmeze: Prezo Lit.800,-.

- Duontaga ekskurso per aŭtobuso al Ravenna (km.52 de Rimini). RAVENNA estas historia urbo de mozaikoj kaj de Dante Alighieri, dum la mezepoko ĝi estis ĉefurbo de Itala regno. Antaŭvidita ĵaŭde la 21-an de majo matene: Prezo Lit.1300,-.
- Tuttaga ekskurso per vagonaro al BOLOGNA, inkluzive aŭtobuso por viziti la urbon kaj la ĉirkaŭaĵojn, kaj tagmanĝon. Antaŭvidita vendrede la 22-an de majo: Prezo Lit.3000 -.

PROVIZORA PROGRAMO

Sabaton la 16-an de majo: Gazetara konferenco. Alveno de la Kongresanoj. Kunsido de I.F.E.F.-Estraro kun L.K.K. Interkona vespero.
Dimanĉon la 17-an de majo: Diservo. SOLENA MALFERMO DE LA KONGRESO. Fotografado. Vizito de la urbo kaj ĉirkaŭaĵoj. Folklora vespero.
Lundon la 18-an de majo: Horo 8,30 Estrara kaj Komitata kunsido (nepublika). Horo 10,30 Estrara kaj Komitata kunsido (publika). Duontaga ekskurso al San Marino. Teatra vespero.
Mardon la 19-an de majo: H.9,- Terminara kaj Junulara komisionoj. H.11,- Statuta kaj Fakprelega komisionoj. Piedpilka ludo. Fakprelegoj kaj filmoj. Junulara vespero kun balo.
Merkredon la 20-an de majo: Horo 10 Plenkunsido. Filmoj kaj vizitoj al fervojaj instalaĵoj. Junularaj aranĝoj. Internacia balo.
Ĵaŭdon la 21-a de majo: Duontaga ekskurso al Ravenna. Fermo de la Kongreso.
Vendredon la 22-an de majo: Tuttaga ekskurso per vagonaro al Bologna.

ATENTU BONE PRI:

KOTIZOJ: Mi varme petas sendi la kotizojn al la adresoj de ni indikitaj en la aliĝilo, nome: Poŝtkonto n-ro 8/24094 de I.F.E.A., Via Donato Creti, 61 I-40128 BOLOGNA. Bankkonto C/C n-ro 02586 del D.L.F. ĉe BANCA NAZIONALE DELLE COMUNICAZIONI. Alie, ni pagos procenton al la aliaj bankoj kaj ni devas peti alian monon de vi.
GLUMARKOJ: La glumarkoj estas tre belaj. Vi povos mendi ilin rekte al la adreso de LKK, Via Donato Creti, 61 = I-40128 BOLOGNA (Italio). La kosto estas 50 it. liroj po folio da 4 glumarkoj. Ekde 10 folioj senpaga sendo.
ALIĜILOJ La aliĝiloj estas jam ĉe la landaj reprezentantoj; bonvolu turni vin rekte al ili; vi ŝparigos al ni tempon kaj monon.

LA SEKRETARIINO DE LKK

40-a KONGRESO DE ESPERANTO - Septembro 1969-a

La 40-a Itala Kongreso de Esperanto malfermiĝis solene, la 14-an de Septembro 1969, en la luksa kaj impona "VILAO OLMO" de Como, la urbo kiu gastigas jam delonge (20 jarojn) unu el la plej konataj kaj ŝatataj grupoj de Italujo: ĝi estas direktita de la aktiva senlaca inĝeniero Giordano AZZI, Vicprezidanto de I.F.E.A., kiu ankaŭ prezidis la L.K.K. de la aktuala kongreso.

Malgraŭ la pluva vetero ĝin partoprenis ĉirkaŭ 600 esperantistoj: krom italoj ĉeestis eksterlandaj delegitoj el 13 landoj, kiuj portis la saluton de siaj asocioj kaj la bondezirojn por feliĉa, fruktodona sukseso al la kongreso.

Honorigis la ceremonion urbaj Aŭtoritatoj, kiel: la urbestro de Como Adv. Gelpi; la reprezentanto de la Turisma Entrepreno Com.Ulzega; D-ro Majocchi kaj CoM.Piatti por la "Azienda di Soggiorno" kaj D-ro Galeffi por la klubo "Esperia". Sidis sur la podio ankaŭ aŭtoritatuloj de nia E-Movado, inter kiuj la plej grava reprezentanto de U.E.A. D-ro LAPENNA, kiu faris poste, la "Fest-paroladon". D-ro Stoppoloni kaj S-ro Grattapaglia reprezentis la Itala-Federacion, kaj Inĝ. Azzi la Grupon de Como. Li, en sia vesto de prezidanto de L.K.K. salutis kaj dankis la urbajn aŭtoritatojn pro la helpo, kiu permesis la efektivigon de tiu bonega kongreso, kaj pro ilia ĉeesto, fine salutis ĉiujn partoprenantojn.

Post la ĝentilaj bonvenaj paroladoj de la Urbestro kaj de aliaj estraranoj, sinsekvis, unu post la aliaj, la salutvortoj de eksterlandaj reprezentantoj: Aŭstrio, Anglio, Belgio, Francio, Germanio, Japanujo, Hispanio, Jugoslavio, Hungarlando, Jerusalemo, Ĝiordanio, Ĉekoslovakio kaj Ruslando. Fine salutata de longa aplaŭdo, jen la atendita festparolado de D-ro Lapenna, kiu, komence, reliefigis la valoron de tiel multnombra eksterlanda ĉeesto: "tio, li diris, pravigas min deklari ĉi tiun, malgranda universala

kongreso". Poste, rimarkante la belecojn de Italujo, ĉu artajn, ĉu naturajn, pri kiuj nia lando estas fama en la tuta mondo, la oratoro asertis ke la itala historio donas klaran ekzemplon de tiu intima (integra) unueco pri kiu oni sinproponas unuigi Eŭropon: la sola kontinento sinmontras matura por tiu atingaĵo. Sed, li aldonis, por sukcesi, oni devas resigni, por ĉiam, la imperialismojn rilate la uzadon de lingvoj, kiuj ne permesas la interkomprenigôn kaj limigi ilin al rolo de la nunaj dialektoj. La precipa tasko de la Coma Kongreso estas ĝuste tiu ĉi: indiki la rimedojn por agi efike ĉu sur la popolamason ĉu sur la registaron por atingi tiun ĉi celon. Longa aplaŭdo salutis la finon de tiu ĉi densa parolado, kiu lasis en la menso kaj en la koro de ĉiuj grandan entuziasmon.

Sekvis la vortoj de D-ro Stoppoloni, prezidanto de Itala E-Federacio, kiu dankis la oratoron pro lia klera prelego kaj la urbaj aŭtoritatulojn pro la helpo kiu permesis la kongreson. Poste li substrekis la celojn: politikan, kulturan, moralan kaj socialan de la 40-a Kongreso de Esp.

Dum la sama posttagmezo kaj la aliaj postaj tagoj, disvolviĝis la laboroj de la kongreso per fakaj kunvenoj, ĝis merkrede: IEF - IFEF - ILEI UECI kaj la E-junularo, kiel ĉiujare, kunigis la anojn por prezenti financan kaj moralan raporton de la jaro; por diskuti la venontan laborprogramon, por ke ĝi akordiĝu kun la programoj de la eksterlandaj grupoj.

Laŭ la amuzado, la ĉiujara programo estis vere riĉa el kulturaj kaj amuzaj vesperoj: teatraĵoj, balo, muziko, tagekskursoj, k.t.p..

Dimanĉon - Post la riĉa akcepto fare de la komunumo, oni amuziĝis per aŭskultado de la kultura prelego, kun lumbildoj, fare de la japana delegito EIZO ITOO kiu prezentis la temon: "Oomoto kaj Artoj en Japanujo".

Lundon - Teatra kaj koncerta vespero, per ludado de spertaj geaktoroj de la "Portiko": "Antologio de la amo en la itala poezio dum la mezepoko".

Mardon - Kongresa balo ĉe la Klubo ESPERIA.

Merkredon - Forveturo per ŝipo al Bellagio kun vizito al "VILLA CARLOTTA" kaj "VILLA MELZI". Oficiala bankedo ĉe hotelo "Gran Bretagna".

ĴAŬDO - Tuttaga ekskurso, per aŭtobuso, al Saint Môritz; komuna tagmanĝo ĉe hotelo Kulm, al Pasejo Maloja.

GIUSEPPINA GAMBERINI

## PROJEKTO POR NOVA TRADUKO DE LA BIBLIO EN ESPERANTO

Unu el la originalaj celoj de la Internacia Asocio de Bibliistoj kaj Orientalistoj estas akceli la pretigon de nova traduko de la Biblio en E.

Intencata estas eldono de la Biblio en Esperanto, konforma al la redakto-normoj jam bone establitaj por BIBLIA REVUO, nome: eksperte tradukita, plene fidela sed literature altnivela, sen eklezia tendenco, ekumena, utiliganta ĉiujn science trovitajn faktojn (arkeologiajn, lingvistikajn, historiistajn, kc.) por la interpreto de la teksto, kaj kun notoj por la neeksperta leganto, teksto tiel akceptebla ekster la eklezioj kiel inter ili.

Nun momente, ni deziras inviti la kunlaboron de talentaj personoj, kies eduko ebligus ke ni profitu per ilia helpo. La tradukoprojekto komenciĝos per pretigo de la Malnova Testamento, inkluzive de la "apokrifoj". Jam de nun ni bezonas kaj deziras formi komitaton por prepari kaj prilabori la tradukon. Personoj kun talento kaj scio pri la sekvantaj fakoj estas bezonataj: la klasika Hebrea lingvo - la klasika Arama lingvo - la klasika Greka lingvo - arkeologio - historio de la antikva mondo (speciale inter ĉ. 2000 a.K. kaj 100 p.K.) - Esperanta literatura stilo (proza kaj, speciale, poezia) - Esperanta gramatiko (prefere, membro de la Akademio) - Bibliaj teologio kaj historio.

Nun ni ne povas antaŭvidi honorarion por la kunlaboro, kaj ni bezonas helpantojn pretajn fari seriozan kaj detalan laboron. Estas dezirinde havi laŭeble grandan grupon de tradukantoj, por ke la traduklaboro povu esti dividita inter ili.

Kiu deziras helpi en la projekto, tiu bonvolu rekte komuniki kun la ĉefredaktoro ĉe la sekvanta adreso: D-ro Donald Broadribb, Dept. of Middle Eastern Studies, University of Melbourne, Parkville, Victoria 3052 (Aŭstralio). Kiu deziras informojn, tiu bonvolu peti al: D-ro Angelo Duranti Prezidanto de Internacia Asocio de Bibliistoj kaj Orientalistoj, Piazza Duomo 4 - I-48100 Ravenna (Italio).

## JARKUNVENO DE ITALAJ FERVOJISTOJ-ESPERANTISTOJ

La 15-an de septembro, ĉe "Villa Olmo" en Como, kunvenis 30 italaj kaj 6 eksterlandaj fervojistoj: S-ro Walder (Svislando) kasisto de IFEF; Greutert (Svislando) ĉefkomitatano de IFEF, S-ro Chapellier (Francio); Parker (Britio) kaj du hispanoj. La tagordo rilatis la varbadon de novaj membroj kaj la preparlaboron por la venonta IFEF-Kongreso, kiu okazos en Rimini de la 16-a ĝis la 22-a de majo 1970-a. Raportis S-ro Germano Gimelli, sekretario de itala IFEF-sekcio kaj prezidanto de la Loka Kongresa Komitato de la 22-a IFEF-Kongreso.

S-ro Walder parolis pri la laboro farita por tiu ĉi kongreso kaj bondeziris. Li parolis ankaŭ pri aliĝo al IFEF de Japanujo kaj pri adoptaj anoj. Salutis en sia propra nomo kaj en la nomo de IFEF-Estraro.

S-ro Greutert raportis pri la Eŭropa Esperanto-feriosemajno organizita de la svisaj fervojistoj kun plena sukceso, kaj pri la korespondaj kursoj.

S-ro Parker memoris la belegan ekskurson organizitan de la fervojistoj dum la U.E.A.-Kongreso en Helsinki. Li memoris, ke la prezidanto de tiu kongreso, S-ro Narvala, estas la Prezidanto de Finna IFEF-sekcio.

Fine salutis la kunvenon, S-ro Chapellier, kiu estas tre konata en nia medio, ĉar vizitas ĉiujn fervojistajn aranĝojn.

S-ro Gimelli, parolante pri varbado de novaj membroj por nia Asocio, montris du vojojn: pere de kursoj, ĉiujare organizitaj de Dopolavoro Ferroviario, kaj eniro en la Asocion de esperantistoj kaj simpatiantoj, eĉ ne fervojistoj. D-ro Menabene el Romo indikis al ni trian vojon, eble pli efikan, nome logi la fervojistojn, pere de Eŭropa ideo, uzi Esperanton en Eŭropaj rilatoj. Li montris afiŝon, eldonitan de D.L.F. en Romo, kiu reklamas kaj rekomendas Esperanto-kurson por fervojistoj en tiu urbo.

Li promesis organizi dutagan ekskurson al Romo tuj post la fino de la 22-a IFEF-Kongreso (sabate kaj dimanĉe).

S-ano Gimelli dirante, ke D.L.F. de multaj aliaj urboj eldonas similajn afiŝojn, inter alie Bologna, Venezia, Verona k.t.p., petis helpon de la itala esperantistaro por nia venontjara kongreso. Li finis dankante la ĉeestantojn, precipe la eksterlandaj kolegoj.

## INTERNACIA ESPERANTA RENKONTIĜO SUR LA NEĜO = ESPERANTA SKI-KONKURSO

Organizita de la Biella Esperantista Rondo, sub aŭspiĉoj de la F.E.I., de la I.E.J. kaj de la Urbo Biella, en la tagoj 3-4-5-6 januaro 1970, en la MUKRONA LAGO (Oropa), fama ski-stacio, altitudo 1900 metrojn s.m.n. je kelkajn kilometrojn de Biella, okazos la INTERNACIA ESPERANTA RENKONTIĜO SUR LA NEĜO kaj la 1-a INTERNACIA ESPERANTA SKI-KONKURSO.

Detalajn informojn petu ĉe la redakcio.

## A N O N C O

Libro Esperanto en Komerco. Raportoj de 100 firmoj kaj organizacioj el 40 landoj pri spertoj kun Esperanto. Ĉiu raporto de lingvoj Esperanto, angla, franca, germana, hispana, 100 paĝoj. Bonega varbilo. Prezo: 1-9 libroj 2 GM. ekde 10 libroj 1 GM. Esperanto-Rondo 718 Crailsheim-Germanio.

## E S P E R A N T O   E N   L A   R A D I O

RADIO ROMA-ESPERANTO - Casella Postale 320, I-00100 ROMA. La dissendoj okazas ĉiudimanĉe de h.21 ĝis 21,20 (M.E.T.) Fakestro: D-ro Renato CORSETTI. Ondlongoj metroj 25,42; 30,90 kaj 41,24.

**KONGRESNUMERO:** ..........................

**22-a KONGRESO DE LA INTERNACIA FERVOJISTA ESPERANTO-FEDERACIO « IFEF »**

**RIMINI (Italio) de sabato la 16-a ĝis vendredo la 22a de majo 1970-a**

**ADRESO:** 22-a IFEF-KONGRESO, Via Donato Creti, 61 - I-40128 BOLOGNA (Italio)
Post la 1-a de majo 1970-a oni devas adresi:
ĉe « Dopolavoro Ferroviario », Viale Regina Margherita, 109 - I-47037 RIMINI (Italio).

**POŜTKONTO:** n-ro 8/24094 de ITALA FERVOJISTA ESPERANTO-ASOCIO, Via Donato Creti, 61 - I-40128 BOLOGNA (Italio).

**BANKKONTO:** C/C n-ro 02586 de « Dopolavoro Ferroviario » ĉe BANCA NAZIONALE DELLE COMUNICAZIONI, Via Rizzoli, 20 - I-40100 BOLOGNA (Italio).

## ALIĜILO

Bonvolu unue atente tralegi la dorsflankajn instrukciojn!

Mi aliĝas al la 22-a I.F.E.F. - Kongreso en Rimini kiel:

☐ **Kongresano:** S-ro, S-ino, F-ino: Nomo ..........................
Antaŭnomo: ..........................

☐ **Familiano:** Edzino, filo, filino: Nomo ..........................
Antaŭnomo: ..........................

☐ **Pensiulo aŭ Junulo:** Nomo ..........................
Antaŭnomo: ..........................

**ADRESO:** Strato kaj n-ro .......................... Loĝloko ..........................
Lando ..........................

Membro de I.F.E.F.: Jes ☐ Ne ☐

Naskiĝdato (pro statistiko) ..........................

**KOTIZOJ: Kongresano:** ĝis la 31-1-1970: Lit. 4500
post la 31-1-1970 ĝis la 30-4-1970: Lit. 6000
**Familiano-Pensiulo-Junulo** ĝis 21-jaroj: pagas la duonon.
**Simbola aliĝo:** minimume Lit. 1000.
**Glumarkoj:** Lit. 50 po folio de 4 glumarkoj plus sendkosto
**Ĉambroperado:** Prezo po lito: Lit. 200.

**LOĜEJOJ:** La hoteloj, tute apude al la maro, estas de la sama kategorio:

prezo por tranoktado kaj kompleta pensiono (sen trinkaĵoj): Lit. 2000 po persono po tage. (Por la tuta semajno de la 16-a ĝis la 22-a de majo: Lit. 12.000, ĉio enkalkulite).

Nur tranoktado: Lit. 1000 po persono kaj nokto enkluzive matenmanĝo (ne konsilinda).

**MANĜAĴO:** Ĉiu manĝo (sen trinkaĵo): Lit. 1000 (ne konsilinda)

Mi mendas, okaze de la menciita Kongreso, por la noktoj:
15-16 16-17 17-18 18-19 19-20 20-21 21--22 22-23
Unulitan ĉambron ☐ Dulitan ĉambron ☐ Trilitan ĉambron ☐
Bonvolu substreki la deziritajn tranoktadojn.

Mi deziras loĝi kune kun: S-ro, S-ino, F-ino ..........................
Se unulitaj ĉambroj ne plu estos disponeblaj, mi konsentas loĝi kun alia kongresano en dulita ĉambro.

Specialaj deziroj (laŭ ebleco) ..........................
La ĉambroperado estas deviga.

**EKSKURSOJ:**

| | | | |
|---|---|---|---|
| Duontaga ekskurso al SAN MARINO (Malnova Sendependa Respubliko) | Jes ☐ | Ne ☐ | L. 800 |
| Duontaga ekskurso al RAVENNA (Urbo de famaj mozajkoj) | Jes ☐ | Ne ☐ | L. 1.300 |
| Tuttaga ekskurso per vagonaro al BOLOGNA, inkluzive tagmanĝon | Jes ☐ | Ne ☐ | L. 3.000 |

## ĜENERALAJ INSTRUKCIOJ

1) Por ĉiu kongresano, ankaŭ por familiano kaj infano, aparta aliĝilo devas esti plenigata. Se oni ne havas aliĝilon, oni uzu samformatan paperon.

2) Donu ĉiujn petitajn detalojn. Skribu klare, legeble, laŭeble tajpe aŭ preslitere. Kie troviĝas kvadratoj (jes ☐ ne ☐) metu krucon en la koncernan kvadraton.

3) Aliĝilo sen samtempa pago minimume de la kongreskotizo ne estos traktata.

4) Sendu aliĝilon kaj pagon kiel eble plej baldaŭ, nepre tiel frue, ke ili atingu la Lokan Kongresan Komitaton antaŭ la 30-a de aprilo 1970.

5) Pagu al la sama instanco al kiu vi sendas la aliĝilon.

6) Pagante por alia persono, bonvolu uzi apartan aliĝilon, sciigante klare la celon de la pago kaj indikante la kompletan adreson de la alia persono.

7) Kiu deziras sendi kun la kongreskotizo kroman sumon al la kongresa kaso por sia kredito, notu nepre tion sur la aliĝilo.

8) La kongreskotizo inkluzivas la prezon por ĉiuj aranĝoj, kiuj laŭ la aliĝilo ne estas aparte pagendaj; ĝi ne estas repagebla, eĉ se la aliĝinto ne povos partopreni la kongreson. Se vi pagos kongreskotizon por alia persono, bonvolu konsideri tion.

9) Aliaj antaŭpagitai sumoj - escepte por ĉambroperado kaj kongreskotizo estas repageblaj post depreno de 10% por administraj kostoj, kondiĉe ke la Loka Kongresa Komitato ricevos la malmendon de la aliĝinto **ĝis plej malfrùe la 2-a de majo 1970-a.**

10) Kongresan karton oni ne rajtas fordoni, vendi aŭ interŝanĝi.

11) **Bonvolu noti en via propra intereso, kion vi mendis kaj pagis.**

## POR UZO DE LA LOKA KONGRESA KOMITATO

— Kongresa-karto sendita la ..........

— Pago por ĉambroperado ricevita la ..........

— Loĝas en Hotelo ..........

— Kongreslibro sendita la ..........

— Notoj ..........